**************************************************************************************
INSTRU-CIRKULERO 2019/01 (majo 2019)
Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj
**************************************************************************************

Per tiu ĉi informilo ni peras interesaĵojn pri instruado, pri eventoj rilate al kursoj, klerigado kaj alvokojn, novaĵojn.

Karaj Gekolegoj!

**1. AGEI-jarĉefkunveno, Germana Esperanto-Kongreso:** ĝi okazos, kiel kutime, dum la Germana Esperanto-Kongreso (GEK).

**Einladung: VDEL-AGEI Mitgliederversammlung**
Der Verband Deutscher Esperanto-Lehrer (VDEL-AGEI) lädt zu seiner jährlichen Mitgliederversammlung im Rahmen des 96. Deutschen Esperanto-Kongresses (07.-10.06.2019) in Neumünster ein. Thema: (Indigene Sprachen). Link: https://www.esperanto.de/de/enhavo/deutscher-esperanto-kongress-2019
Email: gekCHEesperantoPUNKTOde (CHE und PUNKTO per @ kaj . ersetzen)
Diese findet **am Sonntag**, den **09. Juni 2019** in Kiek in!, Gartenstraße 32, 24534 Neumünster https://www.kiek-in-nms.de statt. Beginn ist um **14:00 Uhr**.
Neben Berichten über die Arbeit des vergangenen Jahres sind Diskussionen über die weitere Arbeit des Verbandes zu erwarten und ausdrücklich erwünscht. Der Vorstand erwartet daher eine rege Teilnahme der Mitglieder.

**Invito al: Jarĉefkunveno de AGEI**
La Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI) invitas ĉiujn siajn membrojn al la ĉi-jara ĉefkunsido, okazonta enkadre de la 96a Germana Esperanto-Kongreso en Neumünster, inter (07.-10.06.2019).
Temo: Indiĝenaj lingvoj. https://www.esperanto.de/de/enhavo/deutscher-esperanto-kongress-2019

La AGEI-kunveno komenciĝos je **14:00 la 09-an de junio 2019** en Kiek in!, Gartenstraße 32, 24534 Neumünster https://www.kiek-in-nms.de statt.

Proponata tagordo:
1. elekto de la gvidanto de la kunsido. Salutado, malfermo. Elekto de protokolanto, kontrolo de laŭstatuta invito kaj decidpovo
2. decido pri la tagordo
3. raportoj de la kasisto kaj la kasrevizoroj
4. raporto de la estraro. Malŝarĝigo de la estraro
5. informado, diskutado pri edukrilataj projektoj
6. pluaj aktivecoj kaj proponoj
7. laborplano por la sekva agadjaro. Decido pri loko kaj dato de la sekva jarĉefkunveno.
8. diversaĵoj

Koran bonvenon!

Kun multaj salutoj kaj danko al ĉiuj, kiuj per membreco kaj agado subtenas nian asocion,

Zsófia Kóródy

Zsófia Kóródy
AGEI-Vorsitzende
AGEI-prezidanto

Instruado de Esperanto estas grava tasko por la disvastigado de nia lingvo. Do, ni invitas ĉiujn interesiĝantojn al la kunveno de AGEI dum GEK por konatiĝi kun la gvidantoj kaj gekolegoj, por interŝanĝi spertojn, por pridiskuti intstrumetodojn, tradiciajn kaj modernajn lerneblojn, ofertojn al diversaj celgrupoj kaj priparoli planojn por la sekvaj jaroj.

**2. IPR**

Jen la retaj versioj de IPR 2019/1 Alirvojo al la nurteksta versio:
http://www.ilei.info/pdf/IPR191_tekste_HHGGMM.txt Amplekso: 80 KB. Pasvortoj ne estas.
Alirvojo al la malpeza versio: http://www.ilei.info/pdf/Ipr191-ete_jhkefhkj87635.pdf Amplekso: 2049 KB
Alirvojo al la printkvalita versio: http://ilei.info/pdf/Ipr191-print_dgsddgu678645.pdf Amplekso: 5458 KB

## 3. KER-ekzamenoj en Herzberg am Harz en junio 2019

la 15an de junio 2019 enkadre de la Tutmonda Ekzamentago okazos sesio en la Esperanto-Centro Herzberg. Elekteblaj niveloj: B1, B2 kaj C1. En ĉiuj niveloj eblas elekti skriban aŭ parolan partojn aŭ la kombinitan t.n. kompleksan ekzamenon. Informoj pri la ekzamenoj laŭ la Eŭropa Referenckadro (KER): https://edukado.net/ekzamenoj/ker
kaj specife pri la sesioj: https://edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj
Kontaktpersonoj, detaloj pri la ekzamenoj kaj pri restado, tranoktado en Herzberg: Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar esperanto-zentrum@web.de

## 4. 52-a Kongreso de ILEI en Ĉaĉak: *Ĉefa temo: "Lernado en virtualaj komunumoj "*

La 52-a Kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) okazos en Ĉaĉak, sudokcidenta Serbio, inter 13-20 julio 2019, en la Fakultato de Teknikaj Sciencoj, apartenanta al la Universitato de Kragujevac. Tio certigas kvalitan okazigon de la jam tradicia dulinga simpozio. Por aliaj, certas bonetosa amikema kongreso kun riĉa programo, malferma ankaŭ al ne-instruistoj. La granda plimulto de la nacianoj de la mondo povas eniri la landon sen bezono por vizo. Vidu la liston (anglalingve) ĉe https://en.wikipedia.org/wiki/Visa_policy_of_Serbia.

Eblas mendi moderprezan loĝadon en studentaj aŭ mezlernejanaj ĉambroj 1-4-litaj, plej multaj kun privataj duŝejoj kaj necesejoj, aliaj kun la komunaj sametaĝe, opcie kun manĝado en studenta aŭ mezlernejana restoracioj, ĉio en konstruaĵoj tuj apud aŭ proksime de la kongresejo.
http://www.ilei.info/konferenco/programskemo.pdf. http://www.ilei.info/agado/Cacak2019.php.
Aliĝilo en PDF-formato. Bonvolu prefere uzi la elektronikan aliĝilon, kiun vi trovos ĉi tie. Loĝmendilo: https://forms.gle/ewYieGDakABqH5R47
Kongreso de ILEI, 2019: Unua Komuniko (IPR 2018/3)
Bonvenon en Ĉaĉak, Serbio, 13 – 20 julio 2019 (IPR 2018/4)
Pri la programo de la 52-a Kongreso (IPR 2019/1)
La konferenco traktos jenajn kaj ne nur tiujn subtemojn de la ĉeftemo:

- Scikreado en retaj lernkomunumoj
- Iloj kaj procedoj por lernado en virtuala medio
- Lingvolernado en virtualaj komunumoj
- Virtualaj komunumoj de indiĝenaj lingvoj
- Lernado de indiĝenaj lingvoj en virtuala medio
- Kondutmodeloj kaj normoj en virtualaj lernkomunumoj
- Retkomunumoj bazitaj sur retejoj de sociaj amaskomunikiloj
- Sociemo en sociaj retspacoj

En la programo: ekskursoj kaj la tradiciaj distraj vesperoj: interkona, nacia, internacia, muzika, bankeda adiaŭa, sed estos ankaŭ io nova.
Nokta trajno trafikas de Vieno tra Budapeŝto ĝis Beogrado, kun du pliaj rektaj tagaj trajnoj el Budapeŝto.
La flughaveno Nikola Tesla en Beogrado gastigas tridek du flugkompaniojn. Vidu ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Nikola_Tesla_Flughaveno_Beogrado kaj eventuale iun nacilingvan version por pliaj informoj. Por atingi la kongresurbon, multaj busoj trafikas dumtage inter Beogrado kaj Ĉaĉak. LKK organizos por vi, se vi petos, la transporton rekte el la flughaveno ĝis la kongresejo.
Por atingi Finnlandon por la UK en Lahtio, uzeblas rekta flugo el Beograd al Helsinki sabaton, la 20-an de julio, kun ekflugo je 06h35 el Beogrado kaj alflugo je 10h10 en Helsinkon, trovebla per https://booking.airserbia.com/dx/JUDX/#/home
LKK organizos malmultekostan transporton el Ĉaĉak ĝis Beograd je konvena tempo por atingi la flugon.

**5. La 48a Internacia Infan-adoleskanta Kongreseto (IIK) okazos inter 20-27 julio 2019 en Lahtio.**
La IIK-ejo estas preta por akcepti vin en naturplena loko, rekte ĉe lago, je nur 10 km de la UK-ejo. La skipo konsistas el diverslandaj gvidantoj, iuj partoprenis IIK-on jam plurfoje, aliaj venos unuafoje. Ili profesie laboras aŭ laboris en lernejoj, kutimas zorgi pri infanoj kiel animanto en kulturcentro aŭ kiel gepatro en sia hejmo. Ĉiuj gvidantoj lertas zorgi pri infanoj kaj ŝatas ludi kun ili. La programo celas amuzi la infanojn kaj instigi ilin paroli en Esperanto. Okazos skoltaj agadoj, ludoj kaj sporto, banado kaj boatado, manlaboroj kaj kantoj, ekskurso kaj certe Esperanto-kursoj. Vespere ludoj, amuza kvizo kaj aliaj interesaj agadoj atendos la partoprenantojn.
La IIK-kotizo de 400 € (B-landoj) aŭ 500 € (A-landoj) kovras loĝadon, manĝojn, programon kaj ekskursojn. UK-anoj povas partopreni kun IIK la merkredan busekskurson al la granda amuzparko en Helsinko kun posta urbvizito. Tuj post la Solena Fermo, UK-anoj povas veturi per IIK-buso al la flughaveno de Helsinko. Kontaktu nin, skribu al: infana.kongreseto@gmail.com.
en, estas IIK-retejo por aliĝi! bertosch.free.fr/iik2019

## 6. Skoltismo en Esperanto

La Verdaj Skoltoj proponas internacian skoltismon en Esperanto. Sekvu niajn aventurojn sur nia blogo! Povas ja esti interesa por junuloj, kiuj lernas Esperanton en lernejo, aŭ/kaj por instigi aliajn eklerni la lingvon. Ĉu ne? Ĉu ekzistas tia asocio en via lando? Niaj partoprenantoj estas inter 10 kaj 19 jaraĝaj. Ili venas el Bruselo, Flandrio, Valonio, Francio, Nederlando, Luksemburgo kaj Germanio. Foje de pli for! https://verdajskoltoj.wordpress.com/ bonvenon en nia nova retejo! http://verdajskoltoj.net/

## 7. Somera Esperanto-Perfektigo (SEP): 1-7 kaj 7-14 julio 2019

Ĝi estas 2x1 semajnoj kun intensa lingvolernado, lingva perfektigo kaj metodika-instrukapabliga trejnado, la kvaran fojon organizita de Esperanto-Centro en Herzberg. Ĉiutage: 6 instruhoroj, posttagmeze urborigardado, ekskursoj kun gvidado, promenado, sportoj (naĝado, biciklado, tabloteniso, ktp.), vespere filmoj, muziko, ludoj, babilado. Aliĝu ĉe: esperanto-zentrum@web.de

**A) Kurskotizoj:** 1 semajno 120,00 €, 14 tagoj 195,00 €. Rabatitaj prezoj: ekz. por studentoj kaj eblas ricevi eĉ stipendion, bv. demandi!



**B) Tranoktebloj:**
1) Hotelo (3 aŭ 4-stela, kun matenmanĝo) 35-60 € / nokto
2) Privata apartamento (se min. 2 personoj) ĉ. 20 € / persono / nokto
3) Favorpreza Esperanto-tranoktejo 15 € / persono / nokto
4) Tranoktado en propra tendo: senkosta

Detaloj, informilo, aliĝilo: http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=95808961

**8. Klerigseminarioj de GEA en Herzberg:** instrukapabligaj sesioj trejnado por movadaj fakuloj
La instrufakoj estas variaj: literaturo, gramatiko, (inter)lingvistiko, movadhistorio, metodiko, informado, varbado, Esperanto-kulturo, ktp.
La lernadon, trejnadon helpos la ellaborata interreta klerigplatformo, kie estos je dispono ankaŭ fakliteraturo, kontrol-testoj, ktp.
**Sekvaj datoj 28-30 junio, 03-06 oktobro (TORPEDo), 13-15 decembro**

ICH Interkultura Centro Herzberg

## 9. Instruista trejnado

La Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando) kaj ILEI denove kune organizas unujaran **instruistan trejnadon** kun la kontribuo de Edukado.net, kiu disponigas la bazajn konojn necesajn por instruado de Esperanto kaj trejnos la partoprenantojn pri metodiko. La kursaro necesigas partoprenon dufoje en la surloka intensa semajna sesio (la unua okazos 14-20.09.2019, la dua 01-07.02.2020) kaj intertempan hejman laboradon, retajn taskojn kaj konsultiĝon kun la kursgvidantoj kaj fine pretigon de laboraĵo pri metodika temo, kies prezento kun la fina ekzameno okazos en septembro 2020. Aliĝantoj ricevos ILEI-diplomon pri instruista trejnado.

**Kondiĉoj**: bona lingvoscio (min. B2, atestilo pri esperanto-ekzameno estas bonvena) kaj baza kono de esperanta kulturo, krome finita mezgrada lernado (tipo de abiturienta ekzameno).
**Partoprenkotizo**: A-landoj: 300 EUR, B-landoj 130 EUR por unu semestro.
Informo kaj aliĝo: interlin@amu.edu.pl aŭ ikoutny@amu.edu.pl

## 10. Libroj, instruhelpiloj, interretaj materialoj

**10. 1.** Aperis nova impona vortaro de la renoma germana lingvisto **Erich-Dieter Krause** en la Novjorka eldonejo Mondial de Ulrich Becker. **Vollständiges Wörterbuch Esperanto-Deutsch/Plena vortaro Esperanto-Germana**. Kun siaj proksimume 150.000 artikoloj ĝi enhavas ne nur la kompletan Esperanto-leksikon de la ĉiutaga lingvo kun multnombraj vortkunmetoj kaj ekzemplodonaj frazoj, sed ĝi ankaŭ prezentas, grandskale, leksikon el ĉiuj faklingvaj sferoj, ankaŭ de la nove kreitaj sciencobranĉoj.
La leksika materialo konsiderinde superas tiun prezentitan en la Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, la aktuala unulingva normverko por Esperanto. La vortaro estas la rezulto de pli ol kvindekjara leksikologia kolektado kaj esplorado de plej variaj tekstoj, inter kiuj Esperanto-publicaĵoj el ĉiuj partoj de la mondo. Tio ĉi konsekvence rezultigis ekzemple, ke ankaŭ la ekstereŭropaj influoj al Esperanto estas adekvate reflektataj. La vortaro krome konsideras la apartajn uzojn de la germana lingvo en Aŭstrio kaj Svislando kaj mencias, certagrade, ankaŭ regionismojn.
La duvoluma vortaro estas nun havebla en la reta vendejo www.esperanto-buecher.de. Por 119,00€ vi ricevas 1486-paĝan profesian vortaron. Al tiu prezo ne aldoniĝas -per normala poŝto kaj ene de Germanio - sendokostoj.

**10.2. Erik Tantal: La Insulo La Mirinda.** 1-a Eldono 2019, Science-fikcio sen spacveturado. E-libro en Esperanto, ĉ. 9000 vortoj. http://esperanto-klaus.de
Lingvojn vi povas lerni je ĉiu aĝo. Tre ĉarmege estas, se vi provas tion sen lernolibroj. Krome vi ne bezonas kursojn. Nur pensu al malgrandaj infanoj. Ili ne uzas skribitajn vokablojn, tamen ili akiras la lingvon kvazaŭ lude. Konsentite, maljunuloj povas travivi problemojn se ili lernas tiamaniere. Eventuale dum la longa vivo ili jam sukcese uzis aliajn metodojn. Tamen rekomendindas provo. Akompanu la germanan protagoniston dum lia vojaĝo al la fora insulo La Mirinda kaj partoprenu liajn spertojn pri la lernado de la lingvo Mondlango. Neniu povis antaŭimagi la efektojn por lia sekvanta vivo.

**10.3. Lernolibro de Ivan Kossey**
Lernantoj bezonas komunikadon kun aliaj lernantoj, precipe samaĝanoj. Tial en la lernolibro por la sesa klaso (dua jaro de instruado), kiun li nun skribas, li enkondukis tuj en komenco ekzemple la temojn:
1. Retumo en esperantlingva Interreto, inkluzive esperanta Vikipedio.
2. Parolado per Skajpo kun alilandaj esperantistoj.
Ĝermoj de tiuj lecionoj jam disponeblas en aktualigitaj dosieroj de la lernolinro. Jen la paĝoj por elŝuti: multimed.zip:https://yadi.sk/d/dwkZp18U3SicnC, Instr.zip: https://yadi.sk/d/Ni1VVmZF3USNpY

**10.4. Lernfilmetoj de Didi Weidmann**
Antaŭ ne longe aperis la 26-a leciono de la instagrama Esperanto-kurso de Didi Weidmann en formo de unuminutaj amuzaj filmetoj "Lernu Esperanton kun Superhundo!" En lia persono blogo li kreis intertempe paĝon kun listo de ĉiuj lecionoj. La listo konsistas el la titolbildoj de la unuopaj lecionoj, klakante sur ilin oni malfermas la koncernan lecionon en instagramo: http://informejo.com/lernu-esperanton-kun-superhundo.html, https://www.instagram.com/explore/tags/esperantokunsuperhundo/

**10.5. Nova retejo en facila Esperanto** https://uea.facila.org/
En la nova retejo, kiu estas intencita por lernantoj, estas du rubrikoj, kie ili povas prezenti sin mem kaj sian agadon. Unu estas "Niaj legantoj" ĉe https://uea.facila.org/niaj-legantoj/, la alia estas "Loke" ĉe https://uea.facila.org/loke/.
La redaktoro kore invitas lernantojn prezenti sin kaj sian agadon en tiuj paĝoj. Por fari tion, unue necesas registriĝi ĉe la retejo. Se ili ne deziras fari tion, ili povas sendi siajn informojn al la redaktoro kaj ŝi mem aperigos ilin. Ĉu ili skribas Esperanton kun eraroj? Ili ne zorgu pro tio, ĉar la redaktoro korektos la afiŝojn antaŭ ol publikigi ilin. Jen la retadreso de la redaktorino: anna.lowenstein@esperanto.org

**10.6. Lingolia – novaj materialoj, aplikaĵo, kvizo:** https://esperanto.lingolia.com/en/